



4*1992*151


STARTO

ORGANO DE ĈEĤA-ESPERANTO-ASOCIO

1952 LANĈOV 1992



40 -  JARA



SOMERA ESPERANTO - TENDARO

Karaj amikoj,

ni ĉiuj scias, kiel la vivo flugas.
Belaj momentoj restadas - vivas!



Inter ilin apartenis kaj en la memoro apartenas mia multjara restado en nia somera tendaro en Lančov - ankaŭ kun mia gaja pudelo Dĵin, bone konata al ĉiuj partoprenantoj. Almenaŭ ĉiumatene li ekzercis - aŭ volis ekzerci - kun ni; li naĝis, promenadis kaj ripozis beate meze de nia societo.

Ĉiutagan komunan kantadon sur suna herbejo - vespere denove ĉe tendaraj fajroj - finis lasta kanto ĉirkaŭ noktomezo, ĉe kiu ni kreis homan moviĝantan ĉenon, plenan de idilio.

Gitaro de samideano Tichý estas jam multajn jarojn muta, li ne vivas plu. Kiom da gitaristoj sekvis de tiu tempo!

Ĉiutage instruado en rondetoj! Tremo antaŭ ekzamenoj! Interesaj horoj de Esperanta historio kaj literaturo kun samideano Vondroušek!

Sekvis ĉiutaga varia laboro por la tendaro. Preparo de ligno por tendaraj fajroj. Tre volonte mi serĉadis kaj ĉefe trovadis fungojn kun neforgesebla inĝeniero Felix. Inĝ. Hlaváč, nomata Pampeliška-Leontodo, lernigis al ni koni novajn florojn kaj drog-herbojn. Atendovicoj antaŭ la manĝejo sonoris de rido. Ĉiu etapo de restado havis karnavalon, ekskurson piede aŭ per ŝipo ktp., ktp.

Komence la tendaro estis tre modesta. Ni lavis nin en rivereto ĉe ĉia vetero; ne ekzistis komuna loko nek por manĝado nek por instruado sub tegmento. La tuta tendara vivo kuris - laŭvorte - en la koro de la naturo, ofte ankaŭ en riĉa pluvo.

Kaj hodiaŭ?

Komforto.

Sub tegmento granda manĝejo kun tradicie eminenta nutraĵo, du grandaj kabanaj por instruado, "ekzekutista dometo" por variaj programoj ...

La ĉefa konstruaĵo de la tendaro enhavas oficejon, spacon por instruistoj, legejon, magazenen, kie oni vendas krom lernolibroj ankaŭ bildkartojn kaj ĉokoladojn.

Por instruado oni ankaŭ gajnis lernobenkojn, seĝojn, benketojn. La tuta sociala apartenaĵo estas evidenta.

Malaperis tendoj - la hodiaŭa Lančov-tendaro estas urbeto de praktikaj kabanaj. Atmosfero de romantika vivo en tendoj tamen vivas - iomete alimaniere - ...

Tio ĉio estis kaj restis kiel rezulto de oferema, multjara persistista kaj tre pena laboro de esperantistoj el Třebíč. Por tiu somera paradizo mi estas dankema al ili - ĝis hodiaŭ!

Estu viva nia bona lingvo, vivu Lančov!

Brno, junio 1992

Alena Růžičková -pavlinová
honora membrino de ĈEA (red.)

LA OFICIALA PRAGA ANTAŬKONGRESO 1992

La brulanta Praga suno bonvenigis en la kvara semajno de julio preskaŭ centon da eksterlandaj kaj dudekon da enlandaj antaŭkongresanoj, por konatigi ilin kun nia glorfama ĉefurbo kaj ĝiaj memorindaĵoj kaj vidindaĵoj. La sufokaera varmego - onidire la plej alta dum lastaj du jarcentoj - ne kapablis forpreni al la partoprenantoj bonan humoron kaj entuziasmon, kiam oni trarigardis la Kastelon kaj malsupreniris sur la malnova kastela ŝtuparo al la Karlopono.

Marda posttagmeza programo estis spicita per tia kuriozaĵo, ke ĝin priskribis merkredo, la 22-an de julio, eĉ la ĵurnalo Večerní Praha (Vespera Prago), el kiu ni citas:

Brila geedziĝo aŭ Kiel ĉiuj komprenis unu la alian

Ion similan la Malnovurba Urbodomo ankoraŭ ne travivis... Hieraŭ posttagmeze enverŝiĝis en la geedzigan salonon laŭvorte inundo da gastoj el Aŭstralio, Meksikio, Kanado, Israelo, Islando, Japanio kaj multaj aliaj landoj. Kaj nur por unu sola celo. Ĉeesti geedziĝon. Kaj la geedziĝo estis brila. Tra la salono portiĝis Esperanto, kaj ĝi estis la lingvo, kiu el la fianĉino Miyuki Arai kaj la fianĉo Kazua Hayashi faris geedzojn. La japanaj gefianĉoj elektis Pragon kiel lokon de sia geedziĝo tial, ĉar kiel ĉiuj esperantistoj senmezure estimas Komenion. Alia, ne malpli bona motivo estis, ke ili vojaĝas el Tokio al Vieno al la 77-a Universala Kongreso de Esperanto. Kaj ankoraŭ unu perlo - la fianĉo laboras kiel advokato, la fianĉino estas finstudinto de Virina Altlernejo en Tokio kaj ambaŭ amas la muzikon de A. Dvořák, kiu ĝuste tial akompanis la tutan ceremonion ...

Merkredo estis tago de alia grava okazaĵo, konferenco pri Komenio en la Kavalira Salono de la Palaco Valdštejn sub aŭspicio de eksministro pri kulturo kaj nuna prezidanto de la ĉeĥa parlamento, s-ro Milan Uhde, kiu bedaŭrinde persone ne ĉeestis. La ministerion pri kulturo reprezentis la vicministro, s-ro Michal Prokop, kiu prezentis salutparolon. La tri prelegojn pri Komenio kaj lia verkaro prezentis d-ino Věra Barandovská-Frank (Pedagogia mesaĝo de Komenio), profesoro doktoro Novobilský (Komenio - pratro de lingvistiko) kaj itala tradukisto de Komenio, profesoro Giordano Formizi (Filozofia - religia koncepto de Komenio).

La konferencon riĉigis du koncertoj, matene dum la paŭzoj inter la prelegoj (violono kaj piano) kaj vespere speciala koncerto de kantistoj M. Smyčka, V. Halíř, H. Halířová, K. Kudlíková kaj klarinetistino Bohuslava Šrutová. La partoprenantoj de la konferenco ricevis novan libron pri Komenio, kies ĉefa parto estas la romano de F. Kožík pri Komenio, "Lumo en tenebroj".

Miroslav Malovec

Ing. Jan Werner

INDIVIDUA KAJ KOLEKTIVA LABOROJ PRI TERMINAROJ

La ĝisnuna agado de esperantistaj terminar-kompilantoj ĝenerale ne kontentigas la universale validajn kriteriojn pri terminaroj, precipe pro ties evidenta trajto de subjektiveco. Pro troa individueco estanta en ties strukturo kaj ankaŭ en ties morfologia aspekto. Tia prijuĝo estas parte aplikebla ankaŭ al Esperantaj fakaj vortaroj, kiuj estas produkto de ne nur procedoj terminografiaj (leksikografiaj), sed, diference de la vortaroj naciaj, estas parte produkto ankaŭ de strebado terminologia, preskaŭ ĉiam nesistema. Plue mi provos ekspliki la bezonon harmoniigi la individuan kaj kolektivajn kontribuojn favore por la kvalito de Esperantaj terminaroj.

Unue, **kio estas terminaro?** Terminaro estas rezulto de klasifiko de nocioj kaj de ties terminigo. Kompreneble, la klasifiko rilatas al certa nevasta nocio-kampo, pli-malpli fermita, ĉar ĝia supro estas difinebla kiel unu genra nocio, ekde kiu la klasifiko ŝtupe branĉiĝas. La branĉaro prezentas rilatojn, ĉu ontologiajn inter tuto kaj partoj, ĉu logikajn en genra-speca sistemo. Terminaro do estas vortaro de nocio-sistemo, sistema kolekto de terminoj, traktanta amplekson de unu genra nocio.

La esploro de nocioj kutime okazas laŭ pluraj kriterioj kaj vidpunktoj. **Demonstre** mi prenos la genran nocion "betono" kaj okupiĝos pri la sistemo de beton-rilataj nocioj kaj terminoj. Unue mi esploras konsiston de betono, poste mi sekvas la specojn de betono laŭ diversaj kriterioj kaj fine mi okupiĝas pri aferoj rilataj. Tiel mi venas al la sistemo de

baza divido, alivorte al la konsisto de la terminaro pri betono:

- A. Betono kaj ties komponentoj
- B. Specoj de betono laŭ 7 kriterioj (speco de ligilo, speco de volumenaĵo, volumena maso, makrostukturo, teĥnologio de produktado, funkciaj proprecoj, celo)
- C. Teĥnologio de betono
- D. Armita betono. Specoj de armaturo
- E. Proprecoj
- F. Statiko de betono kaj armita betono

La dua esenca etapo estas la terminigo de nocioj en la formo de propono de optimuma nomo.

Kio estas individua laboro? Iom simpligite mi asertas, ke ĉiu mensa laboro estas individua, ne kolektiva. La kolektiva trajto de mensa laboro signifas interefikon de individuaj starpunktoj kaj ŝovon de la originala propono en iu direkto, kiu devus esti pozitiva, iranta al pli alta interna valoro, al pli objektiva nivelo. Intence mi uzis kondicionalon, ĉar la rezulto de kolektiva traktado, kiu ne estas gvidata akorde kun etikaj leĝoj, estas markita per neadekvataj prestiĝaj premoj, la kompromisa rezulto povas en tia situacio sinki kompare kun la originala propono.

Individue estas eble fari **terminografian laboron**, kiu termine elĉerpas fakan literaturon kaj prezentiĝas en la formo de aktualaj vortaroj. Individue estas eble fari nur **proponon de terminaro**, kiu eĉ post konsulto en kolektivo de fakuloj kaj post kontrolo de lingvisto restas propono ĝis la tempo, kiam la faka lingva ko-

munumo akceptas ĝin, aŭ kiam pri ĝi decidas kompetenta, kumtime oficiala institucio. En la Esperanto-movado tian institucion ni ankoraŭ ne havas.

Je la demando, **kio estas kolektiva laboro**, estas nun facile respondi. Kolektiva mensa laboro en strikta senco ne ekzistas. Se ni akceptus ĝin, ni venus al iu speco de totalisma partia sistemo, en kiu la kolektivo akceptus ies gvidan rolon. Laŭ mia imago la kolektiveco en prilaboro de terminaro signifas organizan flankon de la tasko, ekziston de gradaj interefikoj inter aro da individuoj, akceptintaj la taskon kree partopreni ellaboron de certa konkreta terminaro. Ilia tasko estas analiza, klasifika, agordiga kaj sinteza.

Batalantoj por la universala realigo de Esperanto kiel la lingvo internacia fieras pri granda kvanto de uzopretaj fakaj vortaroj kaj terminaroj. Sed ili eble ne scias, ke temas pri plejparte verkoj nesufiĉaj, esence neperfektaj. Tiun staton kaŭzis precipe troa memfido de la aŭtoroj, kiuj agis sur la tereno tro amatore. Koncerne terminarojn estas necese konscii du ĉefajn procedajn **mispaŝojn**:

- a) **preterlason de teoria bazo de terminologio,**
- b) **prezenton de verko de nur unu aŭtoro.**

La teorian bazon ne eblas preterlasi, ne eblas labori ekzemple sen nocio-sistemo. Sed mi volas turni atenton precipe al la individueco kaj kolektiveco.

Teknike organiza flanko de la terminologia laboro povas havi diversajn facojn. Estas eble procedi de **komplete individua** propono tra komisiona detala prijuĝado en kelkaj etapoj ĝis la versio, akceptita de

plejparto de membroj de la kolektivo. Poste sekvas ekstera prijuĝado flanke de fakaj organizaĵoj, kiu povas ankoraŭ elvoki revizion de la lasta versio. La kompleksan procedon entreprenas organizaĵo, mi diru ekzemple Terminologia Esperanto-Centro. Laŭ mia opinio eĉ la nuna versio ne ĉesas esti propono, ĉar miasupoze la pozicio de TEC kaj de neniu alia institucio en la movado estas konsiderinde aŭtoritata.

Diference de la individue prilaborita unua versio de terminaro povas la ellaboro **procedi popaŝe en iu kolektivo** aŭ rekte en tiucele konsistigita terminara komisiono. Organize la procedo iom diferencas, ĉar la unuan version povas ellabori pliaj personoj, ĉiu alian parton laŭ interkonsento, surbaze de la unue kompilita kaj interkonsentita nocio-sistemo. La celo kaj rezulto restas la samaj kiel ĉe la antaŭe priskribita individua propono.

La teknika-organiza flanko de la procedo kaŝas en si plurajn detalojn, kiuj povas multface diferenci. Pri ili mi ne volas paroli, ĉar mi opinias, ke ĉiu rajtu la detalojn solvi laŭ sia propra maniero kaj laŭ lokaj kondiĉoj.

Grave estas sekvi **konsiston de la kolektivo**. Gvidanto de la kolektivo estu homo fake kaj lingve kvalifikita, lia karaktero estu premiso de la demokrata traktado en la kolektivo. Membroj de la kolektivo apartenu al diversaj etnaj komunumoj kun malsamaj lingvoj. Tiu ĉi principo estas defenda aranĝo, kies tasko estas la rezultan verkon ŝirmi kontraŭ t.n. **pragmata sperto**, havanta radikojn en la gepatra lingvo kaj en la sturkturo de la komunumo, kiu ĉiun edukis al specifa valoro de lingvaj esprim-

rimedoj. La aparteno al etna lingva komunumo prezentas multe pli fortajn ligojn, ol la aparteno al speciala komunika komunumo de esperantistoj. Tiu ĉi komunumo estas homogena nek el la vidpunkto de geografia disetendo, nek de etna deveno de ĝiaj membroj, nek el la vidpunkto de la scipovo de la planlingvo. La diversnacia konsisto de la kolektivo helpas minimumigi la gradon de influo per la gepatra lingvo kaj ankaŭ strangajn subjektivaĵojn.

Antaŭ ol fini, permesu al mi montri, ke la individua prilaboro de terminaroj ne estas senmakula eĉ tiam, se la aŭtoroj estas bonaj fakuloj kaj esperantistoj. Krom la indicoj de pragmata sperto, kiujn aŭtoro malfacile registras, aperas relative ofte fenomenoj pure subjektivaj, kiujn aŭtoroj pretas trudi al la lingvo. Izolajn barojn por tiaj ekstremaj povas levi la ĝusta kolektivo de aŭtoroj.

La sufiksoidon -aĉ/ ne estas necese al vi ekspliki. Uzante ĝin ni montras neteknikan, sed pure sentan esprimon de malplaĉo. Tamen A. Broise en "Teknika terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj" (UEA, 1959) uzis la terminojn "talusmuraĉo" kaj "dovelaĉo", kvankam la nocioj estas pure teknikaj kaj ne bezonas montri ies malplaĉon. Simile K. J. Moberg en "Konstruteknika terminaro sveda-esperanta" (1958) uzis la terminon "subtapeta paperaĉo" aŭ "subtapeta tolaĉo", nepre neadekvate.

Gerard Cool en "Proponaro de geometria terminaro gimnazinivela" (1982) rifuzas geometrian terminon "seki" kaj proponas uzi en tiu signifo "tranĉi", ĉar (mi citas) *"seki laŭ mi tute ne povas praktike prononciĝi kaj prononcaŭdiĝi alie*

ol "seksi". Tio nepre ŝokas min, sed tamen igas min opinii, ke vere tiu esprimo ne taŭgas." La alpaŝon mi ne komentas.

Olav Reiersol en "Matematika kaj statistika terminaro Esperanta" (1987) devias de la Zamenhofa Esperanto kaj ne uzas la sufiksoidon -ig/ en la derivitaj verboj:

duobli - multipliki per du;
duoni - dividi en du egalajn partojn; dividi per du;
kubi - trovi la kubon de;
obli - multipliki per pozitiva entjero;
oni - dividi per pozitiva entjero;

La aŭtoro ekzemple apudmetas la transitivsencan "duoni" (fakte netraktivita) kaj "dividi" kaj tamen indikas la ĝenerale uzatan version "duonigi" erara, ĉar laŭdire *"kiam ni duonas angulon A, ni ne igas la angulon A duona, sed konstruas alian angulon, kiu estas duono de A."* Sofismo de la rezono de O. Reiersol estas evidenta.

Resumante la temon mi akcentas, ke la primara krea povo venas de individuoj, kiuj strebas plenumi la taskon, kiun ili mem iniciatis aŭ kiun ili akceptis. Kolektiva unueca racio ne ekzistas. Sed povas kaj vere devas ekzisti kaj utili kolektiva organiziteco esence akcelanta plenumon de taskoj. En la Esperanta terminologia aktivado tre gravas la institucia decidado. Koncerna movada institucio akiru sian aŭtoritatecon per natura evoluo, per kvalito de siaj labor-produktoj, ne per ia elcentra komisiio kaj deklaro. Sen la aŭtoritata institucio la movado en faklingva tereno plu diletos kaj la terminar-farantoj estos plu diletantoj.

Brno, 1992-06-30

JARLIBRO DE ĈEA 1992

Okaze de la Praga Antaŭkongreso ĈEA eldonas sian unuan Jarlibron, en kiu la legantoj trovos informojn pri la asocio, adresojn de kluboj, sekcioj, komisionoj kaj Esperanto-firmaoj, supervidon pri esperantaĵoj eldonitaj inter 1969-1992 kaj koncizan historion de Esperanto en Ĉeĥio, ankaŭ liston de internaciaj Esperantaj organizoj, institucioj, gazetoj, informojn pri Esperanto-literaturo. Celo de la broŝuro estas ĉefe esperigi kaj kuraĝigi niajn samideanojn, al kiuj povas ŝajni, ke Esperanto jam cedas al la angla. Tiu impresoj povas pesimismigi ĉefe tiujn, kiuj ne konas bone la situacion de Esperanto en la mondo kaj en nia lando. Tial ni penis bildigi la situacion plej vive, sed kompreneble, kiel ĉe ĉiu novaĵo ni certe ne evitis multajn mankojn. Ni estos dankaj, se la legantoj sendos siajn rimarkigojn al la redakcio de Starto. Verŝajne jarlibroj aperos regule ankaŭ en la venontaj jaroj, kvankam ne tute same aranĝitaj.

- mm -

KUNLABORO KUN HARTFORD

La nova Sud-Novanglia Esperanto-Societo (SNEES) en Hartford (usona ŝtato Connecticut) urbo, kie en najbaraj domoj verkis Mark Twain kaj Harriet Beecher Stowe (Kabano de onklo Tom), ricevis multajn gratulojn el la tuta mondo, sed plej multe el Ĉeĥoslovakio. Kelkaj niaj samideanoj estis menciitaj en la bulteno SNEES. La societo starigas amikajn kunlaborajn rilatojn kun la kluboj en Le Mans (Francio) kaj Brno (ĈSFR), kun kiu ĝi interŝanĝos ne nur klubajn bultenojn, sed ankaŭ preleĝojn kaj klubajn programojn.

SVISA RADIO INTERNACIA en Bern elsendadis po 10 minutoj trifoje semajne en Esperanto, sed ekde aprilo 1992 la E-elsendoj estis ĉesigitaj. Intertempe reagis ducento da aŭskultantoj, kiuj forte bedaŭras la malaperon de la Esperanto-disaŭdigoj. Se ankaŭ vi apartenis al la aŭskultantoj, vi povas skribi en Esperanto (aŭ germane, angle, france) al la direktoro: Radio Suisse Internationale, S-ro R. Oppenheim, directeur, CH-3000 Bern 15. Ne temas pri malamika ago flanko de la direktoro, sed la ekonomia premo devigas ĉesigi ankaŭ aliajn lingvojn en Svisa Radio Internacia (ekz. la portugalan). Tamen la redaktoroj serĉas novajn formojn de laboro en Esperanto kaj espereble ili jam trovis ĝin: kasedojn kun monata Radio-programo.

Interesitoj skribu al la sama adreso supre menciita.

KOMPUTILO KAJ LITERATURO

Post telefono, televido, magnetofono kaj video penetras en niajn hejmojn nova helpanto, komputilo. Ĝi povas esti speciale utila por nia Esperantolaboro. Kiel vi jam rimarkis, komputile ni preparas Starton, komputile preparis la Jarlibron de ĈEA kaj libron pri Komenio "Lumo en tenebroj", komputile estas prilaborata nova vortaro. Komputilo preparis novan terminaron pri stomatologio kaj preparas por eldono la romanon Milito kontraŭ Salamandroj de Karel Čapek.

Kutime tiuj, kiuj preparis altkvalitajn manuskriptojn, ĉu originalojn, ĉu tradukojn, ĉu fakajn, ĉu beletrajn, ne posedas komputilon, kaj al ilia laboro minacas, ke ĝi kuŝos senutile en tirkesto aŭ eĉ perdiĝos, kiel jam multfoje okazis post morto de la aŭtoro.

La plej bona rimedo, kiel savi kaj utiligi la ekzistantajn manuskriptojn kaj akceli poresperantan laboron per komputiloj, estus, se ĉiuj esperantistoj, kiuj havas je dispono komputilon kaj scias labori per ĝi, komencus kunlabori. Ili povus interŝanĝi spertojn (ekzemple kiel solvi la problemon de supersignoj) kaj ankaŭ surdiskigitajn tekstojn por kontrolo aŭ plua laboro kaj disvolvado, kaj ili povus ankaŭ proponi surdiskigon de manuskriptoj al tiuj, kiuj havas manuskripton, sed ne komputilon. Ekzemple nur sinjoro Vondroušek havas dudekon da manuskriptoj, kaj laŭ niaj informoj ekzistas ĉe aliaj homoj tradukoj de tiaj verkoj kiel Spartako de Loukotková, Severe observataj trajnoj de Hrabal, Ŝvejk de Hašek, La plej granda el pierotoj de Kožík, Kaprica somero de Vančura, Legendo pri Sankta Venceslao kaj multaj aliaj, ankaŭ abundo da fakaj verkoj kaj terminaroj atendas enkomputiligon.

Nuntempaj komputiloj scias enkomputiligitan tekston rapide prilabori kaj dum kelkaj horoj komposti tutan libron. Enkomputiligita verko estas jam preskaŭ eldonita verko.

Ĉu ni lasos la verkojn putri aŭ ĉu ni eklaboros? Ĉu anonciĝos tiuj, kiuj havas je dispono komputilon kaj emon al helpo?
Miroslav Malovec

LUMO EN TENEBROJ

estas romano de František Kožík pri Komenio, kiu ĵus aperis (okaze de la Praga antaŭkongreso kun komeniologa konferenco) en Esperanta traduko de Zdeněk Rusín, kun fragmentoj el pedagogiaj kaj filozofiaj verkoj de Komenio kaj el Labirinto, kiujn tradukis Miroslav Malovec. La 128 paĝoj prezentas la vivon

kaj ankaŭ verkon de nia glora instruisto de nacioj en sufiĉe prestiĝa formo. La preparaj laboroj daŭris proksimume 5 jarojn, helpis ankaŭ s-ro Roy McCoy el la grafika fako de UEA (per kompostado).

La libro estas mendebla ĉe la oficejo de ĈEA, Jilská 10, 110 01 Praha 1.



EN OLMOUC PRI KOMENIO

Solenajon okaze de 400-a naskiĝdatreveno de J.A. Komenský, aranĝitan la 29.3.1992 en preĝejo de Hus en Olomouc partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la loka Esperanto-klubo. Prezidanto de la klubo, prezentis tie mallongan referaton je la temo "J.A. Komenský kaj la ideo de internacia lingvo".

Artikolojn je la sama temo publikigis poste ambaŭ gazetoj de Olomouc, Hanácké noviny kaj Puls.

Dr. Vladimír Mohapl

MALGAJA INFORMO EL KOLÍN

La 8-an de junio 1992 forpasis MVD-ro Zdeněk Křupka, prezidanto de la Klubo de esperantistoj en Kolín kaj la ĉefapogilo de la tiea Esperantomovado. La asocio kondolencis al la familio.

Ni esperu, ke la morto de D-ro Křupka ne estos kaŭzo de malaktiviĝo de la Esperantomovado en la urbo Kolín.

- zp -

ĈEĤA FILIO DE AIS SAN MARINO OKAZIGAS ĈEĤAN STUDAD-STAĜON

en la Pedagogia fakultato en Prago, Celetná 13 (15.-18. septembro 1992) por konatigi vastan publikon, precipe studentojn, kun evoluo de interlingvistiko, informadiko kaj kibernetika pedagogio. Prelegos Doc. Dr. Věra Barandovská (En konduko en la interlingvistikon, ILO por sciencaj laboruloj - rapidkurso) kaj Prof. Dr. Helmar Frank kun Prof. Dr. Miloš Lánský (Pedagogiaj kaj informadikaj aspektoj de la interlingvistiko). Partoprenkotiĝo estas 30 DEM por eksterlandanoj kaj 20 Kĉs por enlandanoj. Aliĝojn akceptas: Ing. Irena Fialová, katedra didaktické technologie, Pedagogická fakulta UK Praha, M.D. Rettigová 4, 116 39 Praha, telefono: 297850-9. Je la sama adreso okazis la 20-an de junio 1992 fonda kunsido de Ĉeĥa Societo por subteni la agadon de AIS San Marino (ĈAIS).

- red -

VERDire

venas en Esperantujojn kiel ekologiisma gazeto por turni la atenton de esperantistoj al la problemoj de vivmedio kaj por amikiĝi du verdajn movadojn. La 16 paĝoj de formato A4 kun eko-

logiaj desegnitaj anekdotoj kaj multaj artikoloj kapablas kapti legantojn. Redaktas Claude Rouget, Radarvn. 5, 9014 Håpet, Norvegio, sed eldonas ĝin Flandra Esperanto-Ligo, abonpago por 4 numeroj kostas 15 NLG (nederlandaj guldenoj) aŭ 260 BEF (belgaj frankoj). Legontoj el nepagipovaj landoj skribu al la redakcio.

FAŬSTO EN ESPERANTO

Unu el plej sukcesaj spektakloj de la Pupteatro Radost en Brno estas Doktoro Johano Faŭsto, verkita laŭ historiaj popolaj tekstoj kaj ludata per klasikaj skulptitaj marionetoj. Aŭtune 1991 UEA petis la teatron pri iu spektaklo por UK Vieno 1992, kaj la artistoj kunlabore kun EK Brno preparis doktoron Faŭston. Bedaŭrinde UEA fine preferis pli malgrandan pupteatron el Slovakio kaj ankaŭ la Praga antaŭkongreso rifuzis klasikan kulturon, tial ŝajnis, ke la tuta laboro estos vana. Fine la teatro ricevis inviton por la pupteatra festivalo en la aŭstria Klagenfurt.

La teatraĵo jam estas surbendigita kaj espereble aperos ankaŭ videofilmo aŭ almenaŭ broŝureto kun la teksto kaj tiamaniere ne estos bona traduko de teksto en Esperanton de Miroslav Malovec tute perdita. Tamen ni demandu nin, ĉu nia Esperantujo havas sufiĉe da bonaj esperantlingvaj teatroj, ke ni povas ĵeti flanken la penon de neesperantista profesia teatro-grupo?

-KaD-

LETERO EL ZAGREBO

estas titolo de nova kroatia E-gazeto, 4-paĝa, formato A4. La gazeto estas sendata senpage al tiuj, kiuj skribos al adreso: Letero el Zagrebo, Internacia Kultura Servo, pp. 49, 41000 Zagreb, Kroatio.

JOSEF RUMLER:

PLUVA ROMANCO

*Venos tempesto nutristino
Kaj ĉielarko aŭgurino*

Kiam la anĝeletoj pisas sur la avĉjan ĝardenon
kaj pura pluvakvo edena havas en flakoj emon
ĉion ĉielan registri - agrablaj estas rigardoj
por ŝi lavanta vazaron kaj ni adeptoĵ de l'artoj
Ke posttagmanĝa ĉielo bravure sin nubtiris
por brila demono rivelu al kiu dankon diri
Ĉar pli parencan aspekton havas skizaro tiu
en disĵetita aranĝo laŭ Boscha refektorio
Rigardu trista Marinjo la tenebriĝan ludon
Pri renversata monero ĝi vekas en ni aludon
Mastre la popolo magia per ŝultroj gestikulas
Tremdancon dancas arbusto kaj bluigafe bluas
ĝis la ĝardeno entute per bluo frenezulas
kaj laŭ la ritmo cimbala ĉiuj fontoj petolas
Kaj kiel buterbatado ŝajnas en altoj tondrado
Kvazaŭ el buterigilo kreme elŝprucas fulmado
Kaj estas ĝi trombo de via tuta liriko fascina
Kaj estas ĝi ankaŭ hobia idolo bienmastrina
Harplekto de ino ĥimera vigliĝas humidigita
Kaj en la romano nin ombas ŝaŭmtajdo ondumita
Sonorilistoj fandu vi sonoratan sonorilon
por are vilaĝojn brakumi per unu bato sopira
Kaj verdajn kuprajn monerojn la arbo pagi proponas
trinkmone al la kapelo kaj reston por poste donas
Pluvego - poemo galopa pro tiu mi plene ĝojas
kaj tion nur tion bedaŭru ke ĝi malĵungi venas
bedaŭru nur tion bedaŭru dormeti ke ĝi emas
Dum tintas sur la kornicoj koncerta rafinado
en miozotoj revulo pri merla promenado
jam senbridigas parfumoĵn kaj bruon kaj flueton
Kaj la falĉistoj iras for ... Ĝardene ekregas silento
Kaj dum vi la striojn eltrinkas ĝis lasta pluvgluteto
la kanto finiĝas per Paul Verlaine kaj Muso la Princineto

Josef Rumler: Lasta Ĉevalo, eldonejo Fonto, Brazilo, 1992, kajero 10, 48 paĝoj, ilustris Karel Oberthor, postparolo Eli Urbanová, eldonkvanto kaj prezo neindikitaĵ

Post La Nigra Spartako (Geraldo Mattos), La Nekonata Dio (Ferenc Mószi), Tri'stas tro (Gerrit Bervelling), Lukio aŭ Azeno (Lukiano), Sonetoj (Marie Under) kaj la kvar evangelioj aperas la deka kajero de libro-serio de Fonto, nun kun eminenta originala poemo de la ĉeĥa poeto Josef Rumler "Lasta Ĉevalo". Dek modernaj, poeziplenaj rondaj ilustraĵoj de Karel Oberthor kun nekutime bela koverto (nekutima ĉe esperantaĵoj) promesas frandaĵon - kaj la poemo ne lasos soifi la ekscititan apetiton. Kvazaŭ vi rajdus galopantan ĉevalon aŭ mem estus spurtanta stalono, tiel impresas la rapide fluantaj versoj kun ŝokanta inventemo de la poeto, kiu kapablas apudstarigi riĉajn vortojn kaj bildojn (*fartas tre bone tre fojne tre avene plenkripe tre sukere tre bonakve la ĉevalo*). La trotanta ĉevalo simbolas la Naturon kiel kontraston al la homa civilizacio plena de malprudentaĵoj:

/ ankoraŭ ne furiozas incendio / en Novjorko Tokio Moskvo Delhio Prago Varsovio / en Pekino Berlino kaj Romo / ankoraŭ servas al ni integre la scio / pri la atomo / ankoraŭ por ni ĉiuj kaj ne kontraŭ ĉiuj /.

La poemo Lasta Ĉevalo certe fariĝos unu el plej gravaj klasi-kajoj de la originala literaturo en la Internacia Lingvo.

Lorens' Mi: Toponomia Terminaro, Belfast 1992, Istlia Eldonejo Esperantista, formato A5, 16 paĝoj, vendoprezo: 4 steloj

La terminaro prezentas kernajn terminojn (lando, regiono, ŝtato, popolo, nacio ktp.) kaj laŭalfabetan nomaron de ŝtatoj, landoj kontinentoj kaj de iliaj loĝantoj. Je unua vido iom ŝokas la malklare presitaj kaj apenaŭ legeblaj etaj literoj kaj ne tre konvena aranĝo de nestoj: la tria linio de difino komenciĝas sur la unua pozicio, kvazaŭ temus jam pri nova termino, kio tre malfaciligas orientiĝon en la teksto. En la enhavo mem estas ankoraŭ multaj mankoj. Oni ekzemple ekscias, ke Ĉeĥoslovakio konsistas el kvar partoj, nome Ĉeĥujo, Bohemujo, Moravujo kaj Slovakujo, en kiuj loĝas ĉefgentoj ĉeĥoj, bohemoj, moravoj kaj espereble ankaŭ slovakoj (kvankam sub S tiu termino mankas!), komune nomataj ĉeĥoslovakoj. Aliflanke la terminaro nenion scias pri Bavarujo, Sak-sujo, Ŝvabujo, Prusujo kpt. ĝi konas nur Germanion. Al la konflikto inter koreaj samideanoj (kiuj nomas sin mem koreoj kaj sian landon Koreio) kaj nia Akademio (kiu nomas la landon Koreo kaj la loĝantojn koreanoj) la nova terminaro kontribuas siamaniere: Koreo estas la duoninsulo, la du ŝtatoj estas Norda-Koreio kaj Suda-Koreio kaj iliaj loĝantoj koreianoj. Por la landoj de la iama Sovet-Unio la terminaro enkondukas la terminon Kusuŝto (Kuniĝo de Suverenaj Ŝtatoj).

Ekzistas nekonsekvencu uzo de -io, -ujo (Bohemio, Bohemujo) kaj de landnomoj (Katalunio, kataluno, sed nur Kartvelio). Tamen, se la terminaro, prilaborita komputile, estos "purigita" kaj kompletigita, ĝi povas fariĝi grava verko por nia movado.

Ambaŭ libroj recenzis Miroslav Malovec

Laborante por Esperanto ni bezonas starigi al ni la demandon **kian celon havas la internacia komunikado?** Ĉu kunlaborigi la homojn aŭ venkigi iun lingvon? Ĉu la homoj lernas ekz. itale por venkigi la italan, por pligrandigi la nombron de itale parolantaj personoj? Ĉu ili aranĝas renkontiĝojn de italistoj por demonstri antaŭ la ekstera mondo, ke pere de la itala lingvo eblas internacie komuniki? Aŭ ĉu ili lernas itale por propra persona utilo kaj profito, ĉu ili renkontiĝas kun alinaciaj personoj itale parolantaj ne por demonstri eblon de komunikado, sed por **rekte** komuniki? Ĉu ili komunikas pri venkigo de la itala kaj pri vetero kaj familia vivo? Aŭ ĉu ili komercas pere de la itala, solvas sciencajn, teknikajn, industriajn, politikajn, kulturajn kaj sportajn aferojn? Ĉiu respondu al si mem.

Tre ofta argumento kontraŭ Esperanto estas, ke ĝi ne povas venki la anglan, ke la angla la venkon ne ellasos el siaj manoj, ke Esperanto ne havas ŝancon en konkurenco kun la angla. Sed ĉu efektive **la senco kaj celo** de internacia komunikado estas ia vetkuro inter la angla, franca, germana, rusa, hispana kaj Esperanto? Ĉu la homoj internacie komunikas nur por surtronigi iun lingvon? Ĉu havas sencon strebi pri tia surtronigo, se ni scias el praktikaj provoj en la kursoj, ke **neniun** el la lingvoj - ne esceptante Esperanton(!) - kapablas ellerni ĉiuj homoj, kiuj klopodas pri tio? La pli granda parto de la kursanoj ĉiam restas eternaj komencantoj, en Esperanto same kiel en la angla, germana kaj en la

ceteraj. Sed tre **optimismiga** estas alia fakto, nome ke ĉiun el la menciitaj lingvoj ellernas sukcese **alia** grupo da homoj. Multaj, kiuj fiaskis ĉe la t.n. mondlingvoj, tute vigle konversacias en Esperanto, sed mi konas ankaŭ malajn ekzemplojn, kiam iu facile parolas hispane, itale aŭ angle, sed Esperanto rezistas kontraŭ li.

La lingva talento ne estas universala, ĉiu individuo lernas facile aŭ malfacile alian lingvon. Iu lingvo postulas bonegan aŭdon, sed minimuman gramatikon (angla), alia havas multajn gramatikajn finaĵojn, sed facilan prononcon (germana, itala, hispana). Esperanto havas facilan prononcon, malmultajn finaĵojn kaj pro sia logika kunmeteblo ĝi ne postulas grandan memoron, sed tiom pli la logikan pensadon kaj vortan kreivon, kiuj al multaj homoj mankas. Tiaj personoj ofte posedas kompanse bonegan memoron, tial ili pli facile lernas lingvojn, en kiuj ili tute ne bezonas pensi kaj derivi, sed sufiĉas al ili memori kelkdek mil pretajn, eble eĉ malregulajn derivaĵojn, kies nombro tamen estas limigita. En Esperanto male oni ne povas lerni ĉiujn derivaĵojn kaj kunmetaĵojn, ĉar oni senĉese formas novajn kaj novajn.

La menciitaj limigoj estas kaŭzo, kial **neniu lingvo** povas esti solvo **por ĉiuj homoj**. Ne havas sencon klopodi surtronigi iun lingvon kaj kvereli pri tio, ĉu ĝi estu la angla aŭ Esperanto. Malgraŭ granda disvastiĝo de la angla restas ĉiam pli granda parto de la homaro, kiu ne kapablas bone uzi ĝin kaj por kiu povas servi aliaj lingvoj, do ankaŭ Esperanto.

Simile malgravaj argumentoj estas pri tio, kiom da milionoj da personoj parolas tiun aŭ alian lingvon. Neniu homo dum sia tuta vivo sukcesos paroli kun miliono da homoj, eĉ ne en sia gepatra lingvo. Ĉiu el ni parolos ĝis sia morto nur kun kelkcent eksterlandanoj, tial ne gravas por ni la kvanto, sed la kvalito de interkompreniĝo.

Estas granda eraro, ke la homoj strebas servi al la lingvoj por venkigi sian favoratan kaj amatan, anstataŭ servi al si la lingvojn, por ke la lingvoj **kunlaborigu** la homojn. Esperantistoj multe propagandas, varbas, demonstras la komunikajn eblojn de Esperanto, sed nur escepte efektive **uzas** la lingvon por internacia kunlaboro. Kutime la kunlaboro koncernas "venkigadon" de Esperanto, sed kiam iu uzas la internacian lingvon por fakaj aŭ beletraĵaj celoj, ne malofte li estas atakata, ke li malfaciligas la lingvon. **Sed kia paradokso: peni venkigi lingvon, per kiu ĝiaj zelotoj nur ludas kaj ne kapablas uzi ĝin por utilaj aferoj eĉ inter si, en sia limigita rondo!**

Sed la ekstera mondo ne lernos Esperanton por partoprenadi niajn klubojn aŭ kongresojn, nek por sendadi novjarajn salutojn, nek por mendi en restoracio kafon. La ekstera mondo lernos ĝin nur tiam, kiam ĝi estos portanto de informoj gravaj por komercado, industrio, scienco, kulturo kaj sporto. Tiam la homoj lernos ĝin volontate eĉ sen varbado kaj propagando. Propagandi facilan, noblan, sed nur ludantan lingvon estas kiel propagandi malplenajn botelojn kaj miri, ke la homoj preferas la plenajn, kvankam pli malfacile porteblajn.

Kaj ĉio ĉi dependas nur de

ni, esperantistoj. Neniu Eŭropa Parlamento, UN, UNESKO aŭ alia institucio povas enkonduki Esperanton en la praktikon, ĉar ili ne scias ĝin. Kaj se ni esperantistoj, kiuj scias la Internacian Lingvon kaj parolas ĝin, ne kapablas uzi ĝin por utilaj aferoj, sed nur por ludado, kiu ĝin faros utila? Sed ni havas ŝancon. Kiel ni en nia propra nacia lingvo scias komuniki pri gravaj aferoj ne zorgante pri la "ekstera mondo", ankaŭ ni esperantistoj devas komuniki pri gravaj aferoj inter ni reciproke kaj poste la "ekstera mondo" interesiĝos mem pri nia laboro.

Esperanto venkos tiam, kiam esperantistoj komprenos, ke ili devas ĉesi **venkigadi** Esperanton, t.e. trudi al la mondo sian nematuran frukton, sed ke ili devas ĝin **maturigi** kaj efektive **uzi**, ne nur montradi, ke ĝi estas **uzebla**.

KASEDA KURSO POR NEVIDANTOJ

Germana esperantistino Ursula Heiden laŭ instigo de ĉeĥaj nevidantaj esperantistoj preparis kasedan kurson de Esperanto. La unuan "kasedrondeton" partoprenis kvar germanoj kaj du ĉeĥoj, nun kuras dek tiaj rondetoj kun partoprenantoj el Germanio, Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Pollando, Francio, eĉ Brazilo. Similan rondeton preparis s-ro Zemčik el Havířov.

Vladimír Trávníček,
Fučíkova 3, 752 01 Kojetín



BELAJ TAGOJ EN POPRAD 1992-11-11/15

Religia seminario de Bahaa Esperanto-Ligo okazos ĉijare en la Esperanto-Centro de la Slovaka Esperanto Asocio. En la jaro 1992 oni festas la centan datrevenon de la forpaso de Baha'u'llah, fondinto de Bahaa-ismo. La BELaj Tagoj estas malfermaj por ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la Bahaa Kredo. Aliĝilojn sendu al Bahaa Esperanto-Ligo, Bernhard Westerhoff, Ulrichstr. 20, D-W-6000 Frankfurt 50, Germanio, tel. +49-69-519845, aŭ rekte al Esperanto-Centro, Sobotské nám. 6, 05 801 Poprad, tel. +42-92-32419 (23539). Ĉiuj kotizoj pagendas surloke.

5-A KULTURA ESPERANTISTA FESTIVALO EN ÚSTÍ NAD LABEM

dediĉota jam tradicie al la rememoro de Jiří Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumper okazos de la 2-a ĝis la 4-a de oktobro 1992. Aliĝilojn sendu ne pli malfrue ol la 20-a de septembro al la adreso: inĝ. Josef Kříž, Družstevní 411/11, 400 07 Ústí nad Labem. Alkiĝkotoj pagotaj surloke ĉe la akceptejo: 30,- Kčs por enlandanoj, 20,- DM por eksterlandanoj.

VINA SEMINARIO EN BZENEC

estas organizota de Junulara Sekcio de ĈEA de la 1-a ĝis la 4-a oktobro 1992 en sudmoravia urbeto Bzenec. Okazos prelegoj pri vinproduktado, pri ĝusta gustumado de vino kun praktikaj ekzercoj, pri moravia folkloro, ekskursoj al la urbetoj Strážnice kaj Uherský Brod, kiuj estas ligitaj kun la junaĝo de J.A. Komenio kaj krome ili famas kiel centroj de moravia folkloro. Ne mankos amuzvespero

kun zimbazona folkloro muziko. Aliĝilojn sendu al la adreso: Jana Burianová, Pod nemocnicí 35, 625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.

PRI NANCIO EN ESPERANTO

Kvarkolora turisma prospekto "Historia Nancio" estas eldonita kaj jam estas disponebla senpage por interesatoj laŭ la anonco de la vic-direktorino de turisma oficejo en Nancio, s-ino Claudine Camus. Petskribu al la adreso: Office de tourisme de Nancy, 14 Place Stanislav, BP 810, F - 54011 Nancy, Francio.

PASPORTA SERVO 92' ĴUS APERISI!

Pasporta Servo estas servo de la Esperanto-movado. Ĝiaj membroj havas la eblecon ricevi senpagan gastadon. Ĉiu, kiu posedas propran (personan) ekzempleron de la listo de gastigantoj, estas membro, kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastigon. Gastigado ne estas luksa, ekzistas ĉiuj variantoj de surplanka dormado en propra dormosako ĝis rajto je utiligo de tuta domo. Necesa kondiĉo: **nepre scii paroli Esperanton!** Gastoj devas la liston aĉeti, gastigantoj ĝin ricevas aŭtomate senpage.

En ĉijara listo aperas en 59 landoj preskaŭ 900 adresoj de gastigantoj. Kun gastiganto vi nepre kontaktu antaŭ la veturo, ne surprizu lin! En la listo estas skribite, kiom da personoj kaj por kiom da tagoj eblas gastii.

Kiel oni povas membriĝi al PASPORTA SERVO?

Aŭ vi povas aĉeti la katalogon de gastigantoj (Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Sekcio de Junularo, Jilská 10, 110 01 Praha) aŭ vi povas mem fariĝi gastiganto (aliĝu al la sama adreso).

PRI AGADO DE NIA ESPERANTISTA JUNULARO NI INTERVJUIS LA SEK-
RETARIINON DE LA JUNULARA SEKCIO DE ĈEA, INĜ. JANA BURIANOVÁ

**1. La sekcio de junularo jam tradicie apartenas al la plej akti-
vaj en ĈEA. Ĉu la samo validas ankaŭ nun?**

Mi opinias, ke jes, kvankam juĝado apartenas ne al ni. Ni klopodas informi niajn membrojn kaj peri ilian partoprenon en eksterlandaj aranĝoj. Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne povas aŭ ne volas vojaĝi fremdlanden, aŭ simple ne sentas sin sufiĉe fortaj lingve, ni okazigas aranĝojn en Ĉeĥoslovakio, ekzemple internaciajn MEJS (Mezeŭropa Junulara Semajno), Vina Seminario, JUSETUR, IMUR (ĉi-jare ne okazis), "Krkonošský ledňáček" (Karkonoŝa Glacisemajno) kaj semajnfinojn por 10-20 personoj - ni deziras, ke venu novaj membroj, konatiĝu kaj iomete "hardiĝu". Vero estas, ke la lasta ne multe sukcesas, ankaŭ ni sentas certan pasivecon de la membra-ro. Sed la internaciaj okazaĵoj intereson vekas, ĉefe ĉe tiuj, kiuj ne povas al IJK (Internacia Junulara Kongreso), kiu okazas en Kanado.

**2. Se vi jam komencis pri MEJS, kiel estiĝis tiu ideo? Ŝajnas,
ke ĝi estas unua aranĝo tiaspeca?**

Nialande en tiu amplekso certe, ĉar ĉiuj ĝis nun okazintaj renkontiĝoj estis pli modestaj, laŭ la nombro de la partoprenan-toj (ĝis 50) kaj laŭ la daŭro (ĝis 4 tagoj). Male MEJS devus esti malgranda eŭropa IJK kun partopreno de 100-150 gejunuloj por unu semajno, kun ĉiuj koncernaĵoj kiel amuzaj programoj, tuttaga ek-skurso, programe konceptitaj vesperoj k.s.

**3. Kiom da junaj esperantistoj laŭ nunaj indikoj partoprenos
MEJS en Olomouc?**

Laŭ la nombro de alvenintaj aliĝiloj ni supozas ĉeeston de 100 homoj ne nur el Eŭropo.

**4. Kaj la Vina Seminario? Onidire konas ĝin junaj esperantistoj
en la tuta mondo?**

Mi ne scias, ĉu en la tuta mondo, sed certan popularecon ĝi akiris, kaj ni ne bezonas plendi pro nesufiĉa intereso pri la jam 4-a Vina Seminario (*pri ĝi ni raportas sur alia loko - red.*).

**5. Kiajn aliajn aktivecojn de internacia signifo ligitajn kun la
sekcio de junularo de ĈEA ni povas rememorigi?**

Ĉijare du niaj membrinoj, P. Dvořáková kaj M. Nýdecká, parto-prenis staĝon ĉe GEJ, kie ili prilaboris la ĉeĥan vortareton por la lernolibro Gerta malaperis! Plue niaj reprezentantoj vizitis la Paskan Renkontiĝon en Italio, IJS-on en Hungario, ĝis la fino de la jaro ni kalkulas kun nia partumo en la somera studenta E-renkontiĝo en Pollando, en TEJO/KER seminario en Italio kaj ĉir-kaŭ la jarŝanĝiĝo en tradicia aranĝo de la germana junularo IS-o, kiun pasintjare partoprenis 10 personoj el Ĉeĥoslovakio.

Dankon por la intervjuo kaj multajn sukcesojn!

-KaD-

J. Procházka

La libron "Aventuroj de Robinson Crusoe" konas legantoj verŝajne en la tuta mondo. Oni ankaŭ scias, ke la romano estis verkita surbaze de realaj okazaĵoj. Kiu do propre estis la homo, al kiu la angla verkisto Daniel Defoe donis la nomon Robinsono Kruŝo? Li estis skota maristo Aleksandro Selkirk, kiu pasigis kvar jarojn kaj kvar monatojn sur insulo en Pacifiko, sur kiu li estis pune surbordiĝita en la jaro 1704. Tiu insulo estas parto de insularo, kiun malkovris en la jaro 1563 Juan Fernandez, portugala ŝipestro en hispanaj servoj. La insularo situas 672 km okcidente de ĉilia haveno Valparaiso kaj konsistas el tri insuloj: *Más a tierra* (hispanlingve: pli proksima al la tero), *Santa Klara* kaj *Más a fuera* (pli fora). La insulo *Sankta Klara* estas apartigita per 18 km larĝa markolo de la insulo *Más a tierra*, sed la insulo *Más a fuera* troviĝas 174 km plu okcidente. Dum la insulo *Sankta Klara* estas nur ŝtonoza rifo, estas la insuloj *Más a tierra* kaj *Más a fuera* montozaj insuloj kovritaj per praarbaro, kies areo estas pli ol 85 km² por ĉiu el ili. Aleksandro Selkir estis surbordiĝita sur la insulon *Más a tierra*.

Kiu vere estis tiu ĉi Aleksandro Selkirk? Oni scias, ke li estis filo de ŝuisto el malgranda skota urbeto Largo. Li naskiĝis kiel sepa infano, kiun gepatroj nekredeble dorlotis, ĉar laŭ tiama superstiĉo estis la sepa infano antaŭdestinita por feliĉo kaj riĉeco. La gepatroj klopodis eduki lin kiel pripenseman kaj honorindan homon, sed ili ne sukcesis. Aleksandro havis nebrideblan temperamenton kaj malgraŭ klopodo de la gepatroj jam en infanaĝo li respektis nek leĝojn nek religion. Li faris plej nekredeblaj stratbubaĵojn. Kiel dektrijara li estris bandon de samaĝaj kamaradoj, kiu teruris la malgrandan urbeton. Foje dimanĉe li kun siaj kamaradoj eĉ malebligis al paroĥestro eniri en preĝejon. Administrado de la urbeto postulis, ke li por tiu ofenda konduto petu publikon pri absolveo kaj ke li promesu pliboniĝi. Sed Aleksandro je destinita tempo en la preĝejon ne venis. Sen postsigno li malaperis kaj lasis sin dungi sur ŝipo. Hejmen li revenis post ses jaroj kiel sperta maristo. Sed li devis pro konfliktoj kun frato forlasi hejmon kaj denove foriri sur la maron.

Tiutempe ekzistis pli multaj tiaj ribeluloj kaj ĉiuj troviĝis sur rabaj, komercaj aŭ militaj ŝipoj. En la jaro 1703 dungis la ŝipestro William Dampier ŝiparon por kombinita raba kaj esplora ekspedicio celanta en Pacifikon. Dampier komandis en tiu ekspedicio du ŝipojn, unu sub lia rekta komando, la duan ŝipon komandis viro, kies nomo estis Stradling. Aleksandro Selkirk, kiu tiam estis dudek-ses-jara, estis dungita sur la duan ŝipon kiel dua stiristo. La ekspedicio tranavigis la Atlantikan oceanon kaj poste ĉirkaŭ la Horna terkapo penetris en Pacifikon. Tie post kelksemajna senvento malaperis la komandanta ŝipo el la viddistanco de la dua ŝipo, kaj ĉi tiu ŝipo do daŭrigis en navigado, sed ne niu sur la ferdeko sciis, kie ili ĝuste troviĝas.

Pasis vico da semajnoj kaj provizo de trinkakvo estis preskaŭ elĉerpita. Nutraĵo estis duonputrinta, ŝipbiskvitoj plenis de vermoj, kaj ĉiun kvinan aŭ kvaran tagon iu maristo mortis. Alek-

sandro Selkirk plendis pli laŭte ol la ordinaraĵoj maristoj kaj la ŝipestro konsideris lin ĉefa grumblanto. Selkirk ne volis plu toleri la mizerajn vivkondiĉojn kaj diris, ke ĉe la plej proksima okazo li foriros sur la firman teron. Sed la ŝipestro la duan stiriston antaŭiris. Foje frumatene li venigis la duan stiriston sur la ŝipestran ponteton: "Tie vi vidas teron, sinjoro Selkirk," diris la ŝipestro, "kaj estos por ni ambaŭ pli bone, se vi forlasis nin."

Oni ne scias, kion Selkirk respondis, sed estas certe, ke lia surbordigo realiĝis senprokraste. Oni ankaŭ scias, ke la ŝipestro donis al Selkirk pafilon, pulvon, kuglojn, tabakon, tranĉilon, kelkajn diversajn instrumentojn, Biblion kaj kelkajn librojn, ĉar li ne volis, ke la plendanta stiristo pereu. Kiam la boato, kiu surbordigis lin, fornavigis, estis Selkirk sur la dezerta bordo sola. Sed li ne malesperis. De du maristoj de la ŝipanaro, kiu sur la insulo iam pasigis kelkajn monatojn, li sciis, ke ne minacas al li danĝero, ke li mortus pro malsato. En montoj vivis multe da kaproj, kiuj estis sur la insulon alveturigataj dum antaŭaj koloniigaj provoj, kaj li posedis ja pafilon kaj pulvon. En grotoj ĉe la marbordo estis langustoj, kaj fiŝoj alnaĝadis ĝis la bordo. Kaj ĉie sur la insulo estis freŝa fonta akvo. Sed kion li tiumomente ne povis antaŭsentii, estis la cirkonstanco, ke la malamikeco de la ŝipestro savis al li la vivon. La ŝipo, kiu lin surbordigis, neniam revenis al Anglio. Ĝia sorto estas nekonata: aŭ ĝi karambolis kaj vrakiĝis aŭ atakis ĝin hispanoj.

Antaŭ ol noktiĝis, li trovis en rokoj sur la marbordo groton, en kiu li poste certan tempon tranoktadis. Dumtage li esploris la insulon. Kiam li trovis ĉe piedo de la plej alta monto plataĵon, li konstruis tie du kabanojn; en unu li mastrumadis, en la alia li tranoktadis. Post kelkaj monatoj li repaciĝis kun sia sorto. Tagojn li pasigis per fiŝkaptado kaj ĉasado. Kiam li plu ne havis pulvon, li fariĝis tiel lerta, ke li sukcesis kapti kaprojn eĉ dum kuro. Plejparton el ili li buĉis, sed kelkajn li malsovaĝigis por lakto. Biblio fariĝis granda konsolo por li, kaj la preskaŭ tridekjara viro, kiu tiel teruris la paroĥestron en Largo, bedaŭris sian antaŭan vivmanieron kaj fariĝis pia kristano. Kiam li ne ĉasis nek fiŝkaptis, li pasigis multe da tempo en branĉaro de granda arbo, de kie li havis bonan elrigardon al la maro. Sed dum la unuaj jaroj li ekvidis eĉ ne unu ŝipon.

El lia vesto fariĝis ĉifonoj, tial li kudris al si veston el kapraj feloj. Kiam pasis du jaroj, foje li ekvidis alnavigi al la insulo du ŝipojn. Sed li ne kuraĝis bruligi fajron aŭ hisi ian flagon. Li kaŝis sin en vepro kaj observis maristojn, kiuj alnavigis en boato al bordo. Unue li supozis, ke ili estas angloj, sed kiam li ekkuris al la bordo, li ekkonis laŭ la lingvo, kiun ili parolis, ke ili estas hispanoj. Li komencis fuĝi, sed la maristoj ekvidis lin kaj komencis persekuti lin. Li sukcesis kaŝi sin en branĉaro de iu arbo, de kie li vidis, kiel la hispanoj klopodis trovi lin. Li vidis ankaŭ, ke ili buĉas liajn kaprojn. La fremdaj maristoj restis sur la insulo tri tagojn. Kiam ili unu tagon malaperis, li kuraĝis malgrimpi. Sur la loko, kie staris liaj kabanoj, restis nur amaseto da cindro.

La lastaj du jaroj sur la insulo pasis sen ekscitemaj eventoj. Foje ja granda pluvego estingis lian fajron, sed li sukcesis fari

alian per frotado de du pecoj de ligno. Tiun li poste zorgeme tenis bonstata en du novaj kabanoj, kiujn li konstruis al si. Lia vivo senĉese pli similis al vivo de necivilizita sovaĝulo, li ne plu kapablis legi kaj eĉ ne faris la noĉan kalendaraĵon.

Dum Aleksandro Selkirk vivis la vivon de forlasito sur la insulo *Más a tierra*, la ŝipestro Dampier finis sian navigadon kaj revenis kun sia ŝipo en Anglion, kie li eksciis, ke la dua ŝipo versimile aŭ karambolis aŭ estis forkaptita de hispanoj. La gepatroj de Selkirk supozis, ke Aleksandro dronis kaj ke ili neniam plu vidos lin.

En la jaro 1707 eknavigis la ŝipestro Dampier denove sur maron, ĉifoje ne kiel komandanto, sed kiel la unua stiristo de ekspedicio de la ŝipestro Rogers. La ekspedicio navigis samdirekte kiel la ekspedicio unua, kaj tial la lastan tagon de januaro 1709 aperis sur horizonto konturoj de la insulo *Más a tierra*. Kiam ambaŭ ŝipoj ankriĝis en golfo ĉe la insulo, subite ekflamis sur la bordo fajro. La ŝipestro sendis al la insulo boaton, kaj tuj kiam la maristoj supreniris la bordon, ekkuris renkonte al ili longbarba viro vestita en kapra felo. La viro falis sur genuojn kaj parolis, sed komence neniu komprenis, kion li volas diri. Nur iom poste ili komprenis, ke li senĉese ripetas unu frazon: "Mi estas anglo, por Dio prenu min sur ferdekon!"

Kiam la sovaĝulo aperis sur la ferdeko, li vekis grandan sensation. La barbon li havis disigita en du harfaskoj kun nodoj sur la fino kaj la harojn kunplektitajn en hartigoj. Li similis pli al simio ol al homo. Kiam la stiristo Dampier alparolis lin, la viro serĉis kun malfacilaĵoj ĉiun vorton por respondi, sed post certa tempo li komencis paroli tiel impete, ke li preskaŭ stumbladis je siaj vortoj. La stiristo Dampier subite rememoris, komprenis liajn vortojn kaj rekonis en la duonhoma estulo iaman duan stiriston de la ŝipo, kiu ne revenis el la ekspedicio. Ĉar la ŝipo, kiu Selkirkon savis, ne havis plenan ŝipanaron, Selkirk - antaŭ kelkaj horoj ankoraŭ duonsovaĝa ermito - fariĝis la dua stiristo. Sed la ŝipoj devis fini sian ekspedicion, nome navigadon ĉirkaŭ la mondo, tial daŭris ankoraŭ unu jaron kaj ok monatojn, antaŭ ol Selkirk povis reveni en Anglion. Li revenis en sian skotan hejmon, sed ĉar lia senbrida temperamento neniel ŝanĝiĝis, aperis novaj malfacilaĵoj kaj konfliktoj, kaj Selkirk forlasis sian naskiĝ-urbeton. Iom poste li vivis certan tempon kun iu junulino en Londono, poste li edziĝis kun iu vidvino. Sed ankaŭ la geedzeco ne estis feliĉa.

En la jaro 1717 ni denove vidas lin sur la maro, en 1722 li estis rang-altigita je leŭtenanto de militŝipo *Weymonth*. Sur la ferdeko de tiu ŝipo li mortis, kaj lia kadavro estis ĵetita en la maron.

Aŭtoro de la libro "Aventuroj de Robinsono Kruso" estis persono tre problema. Lia beletra aktiveco estas nur eta parto de lia vivlaboro. Kiam li debutis kiel romanverkisto, li estis preskaŭ sesdekjara. Ĝis tiu tempo li vivtenis sin kiel politikisto, politika spiono, ĵurnalista kaj komercisto. Kelkfoje li bankrotis, estis eĉ en malliberejo por ŝuldantoj. Librojn li verkis nur malmultajn, sed lian nomon famigis la libro pri Robinsono.

Ĉu ambaŭ viroj, Selkirk kaj Defoe, iam renkontiĝis? Sendube la restado de Selkirk sur la insulo *Más a tierra* estis modelo por la

ĉefverko de Defoe. La verkisto uzis multajn karakterizajn detalojn el la ermita vivo de Selkirk. Sed kiamaniere li eksciis tiujn detalojn, tion neniu scias. Ekzistis konjekto, ke Defoe ŝtelis al Selkirk liajn notojn kaj donis al li eĉ ne heleron, sed tio neniam estis pruvita. Onidire laŭ ĉi tiu konjekto, kiam foje al Selkirk mankis mono, konsilis al li la ŝipestro Rogers, ke li vizitu la verkiston Defoe kaj proponu al li manuskripton de siaj notoj por tralego. Defoe onidire la manuskripton tralegis, ĝi plaĉis al li, sed poste li reverkis ĝin, sed al Selkirk li diris, ke la historieto estas tute ne interesa. Sed ne ekzistas eĉ ombro de pruvo, ke Selkirk transdonis la manuskripton al Defoe, oni ja eĉ ne scias, ĉu vere Selkirk sur la insulo *Más a tierra* faris notojn pri siaj travivaĵoj. Plej versimila estas la konjekto, ke Defoe legis pri la ermita vivo de Selkirk en tiamaj bulvardaj gazetaĉoj kaj surbaze de tiuj artikoloj li verkis sian romanon. Poste li devis senpove rigardi, kiel eksterlandaj eldonistoj tradukas ankoraŭ freŝan Robinsonon Kruso, dum li profitas por tio eĉ ne unu pencon. Li ĉiam balanciĝis surrante de bankroto, sendube al li helpis almenaŭ enspezoj de multaj anglalingvaj eldonoj.

En la libro tamen estas rimarkeblaj lokoj, kie Selkirk finiĝas kaj kie komenciĝas Defoe. La verkisto verkas pri tropika klimato, en realo estas klimataj kondiĉoj tie mildaj. Li priskribas ekzemple kreskaĵojn, kiuj kreskas sur la bordoj de la rivero Amazono, dum lamoj, ankaŭ aperantaj en la romano, vivas nur alte en la montaro Andoj. Krome li aldonis en la libro nigrulon nomitan Vendredo kaj diversajn kanibalojn. Certe tie ludis sian rolon ankaŭ fantazio de la verkisto.

La insularo de Juan Fernandez estas parto de Ĉilio kaj *Los Fernandecinos*, kiel insulanoj nomas sin, estas ĉiliaj ŝtataj civitanoj. Nombro da loĝantoj estas ĉirkaŭ 500 kaj ĉiuj vivas sur la insulo *Más a tierra*. La kolonion fondis en la dua duono de la 19-a jarcento sviso Alfred von Rodt, kiu post la germana-franca milito transloĝiĝis en Ĉilion. En Valparaiso li eksciis, ke eblas lui la insulon *Más a tierra* kaj li serĉis lokon, kie li povus fondi, kiel li mem diris, "surteran edenon", li luis do la insulon. Li estis riĉa, la tutan sian posedaĵon li investis en ĉasadon de langustoj, sed dum 30 jaroj li perdis ĉion ĝis la lasta helero kaj *Más a tierra* donis al li eĉ ne tiun "surteran edenon". En kolonio li postlasis 5 filojn, kiuj daŭrigis laboron de sia patro. Ankaŭ nuntempe la plej granda kvanto de omaraĵ aŭ langustaj konservaĵoj, kiuj estas haveblaj en okcidenta Eŭropo, devenas el la insulo *Más a tierra*. Dum la unua mondmilito okazis ĉe la insulo marbatalo, en kiu estis detruita la germana batalŝipo Dresden. Parto de maristoj, kiuj el la dronigita ŝipo saviĝis, vivis poste sur la insulo kelkajn monatojn. Post la milito iuj el ili denove revenis sur la insulon. Unu el ili, Hugo Fasdinger, kiu alvenis sur la insulon en la jaro 1932, foriris en la ĝangalon kaj sur la plataĵo, kie iam staris la kabanoj de Robinsono Kruso, li konstruis lignan domon kaj realigis sian malnovan revon vivi kiel Robinsono. Li loĝis tie 12 jarojn, dum lastaj jaroj li havis eĉ kunulinon, germaninon Henni Stade. Sed iun tagon ili ambaŭ revenis sur la marbordon kaj per la unua ŝipo fornavigis. Ekde tiu tempo neniu aŭdis ion pri ili.

La Inka Poemo

En guto de inko duondormas mia nova poemo.
Mi amegas nur ŝin el kristala pokalo el ...
Inundo de amo el koro mia transportiĝas
en vian koron,
kaj samtempe sonas al mi kanto
de feliĉo kaj amo el montoj senvivaj.
El rusta plumo defluas inko blua
kaj koro sendas sur paperon oran
poemon de amo,
kiun al vi el amo nun mi dediĉas.

Infano

La malgranda kreito
en sablo al si burgojn kaj kastelojn
konstruas.
Ĝi havas etan kapeton,
manetojn malgrandajn, sed koron grandan
- koron de granda konstruanto de estonteco.
Ĝi sola ne antaŭscias, ke ankoraŭ centfoje
ŝanĝos ĝi revojn siajn malsimplajn
kaj centfoje havos okazon
denove apliki revojn siajn infanajn,
centfoje falegos
ĝiaj infanaj revoj en riveron de la vivo.

La Reĝo

Kiel venkita reĝo
mi retiriĝis el la batalejo
sur kiu restis mia koro
pro doloro granda je pecetoj dishakita

Mi estas reĝo
sen hejmo de amo
sed anstataŭ tio vivon mian mi ankoraŭ havas
Se mi posedus tiom da vivoj
kiom mi havis da espero kaj trompiĝoj
ĉion ĉi mi volonte fordonus
por ke ankaŭ mi eksentu fine
ĝojon en la koro

Sed
kion jam
Tia estas ja fatalo de reĝo
tia estas ja fatalo de poeto
Tio ne povas jam ŝanĝiĝi

Kial infanoj similas al siaj gepatroj? Kial jen al la patro, jen al la patrino? Kial aperas ĉe ili trajtoj kaj kvalitoj hereditaj de avo aŭ avino? Kial nigrahara patro kaj flavhara patrino havas unu infanon nigraharan, la duan brunharan kaj la trian flavharan, kvankam oni atendus, ke ĉiuj infanoj estos "miksitaj", do brunharaj?

Tiaj kaj similaj demandoj incitas la homan scivolemon jam dum jarmiloj. La respondon trovis moravia germanlingva fizikisto kaj botanikisto, abato de la aŭgustena monaĥejo en Malnova Brno, Johano Gregoro Mendel (22.7.1822 - 6.1.1884).

Li naskiĝis en la silezia Hynčice en familio de malriĉa servutanta kampulo, kiu hereditigis al li laboremon kaj amon al la naturo pere de abelbredado kaj ĝardeno. Johano estis la plej talenta kaj samtempe la plej malriĉa lernanto en la lernejo, tamen la gepatroj sendis lin al gimnazio en Opava. En 1840 li eniris Filozofian Instituton en Olomouc, sed financaj problemoj devigis lin fariĝi monaĥo en Brno kaj akcepti la nomon Gregoro. La abato Napp ebligis al li studadon en la Viena universitato (1851-1853). Post reveno Mendel instruis fizikon kaj natursciencojn en la reala gimnazio en Brno, samtempe li startigis siajn genetikajn eksperimentojn kun pizo en la monaĥeja ĝardeneto. En 1865 li prelegis pri siaj malkovroj en Natursciencia Societo en Brno, lia prelego estis eĉ publikigita, sed neniu komprenis lin. En 1868 li estis elektita abato kaj en 1884 li mortis. Neniu sciis, ke oni

entombigas unu el la plej grandaj sciencistoj de la 19-a jarcento.

Nur en 1900 malkovris la genetikajn leĝojn ankaŭ H. de Vries (1848-1935) kaj C. Correns (1864-1933) kaj samtempe ili trovis, ke Mendel anoncis siajn rezultojn jam en 1865. Plie lia metodo de laboro estis pli scienca kaj sistema, montriĝis avantaĝo, ke li estis ĉefe fizikisto kaj nur poste botanikisto.

Nova estaĵo formiĝas per kuniĝo de vira seksĉelo (spermo) kaj ina seksĉelo (ovo). La du seksĉeloj estas fakte duonĉeloj kaj nur per ilia kuniĝo kreiĝas kompleta ĉelo. La spermato enhavas informojn pri kvalitoj heredataj de la patro, la ovo enhavas kvalitojn heredatajn de la patrino. Ido ricevas ĉiun kvaliton duoble, po unu de ambaŭ gepatroj. Tial filo povas heredi nigrajn harojn de la patro kaj flavajn de la patrino, sed nur la pli fortaj (nigraj) aperas sur lia kapo, dum la malpli fortaj (flavaj) restas kaŝitaj nur kiel informo en la korpaj ĉeloj. En ĉiu ĉelo de nia korpo ekzistas kompleta informo pri kvalitoj hereditaj de ambaŭ gepatroj, do ĉio duoble. La seksĉeloj estiĝas per duoniĝo, sekve en unu duono restas informo pri la nigraj haroj, en la alia duono informo pri la kaŝitaj flavaj haroj. Tial nova infano (nepo) povas heredi de sia nigrahara patro la kaŝitajn flavajn harojn, sed ili aperos sur lia kapo nur tiam, kiam li heredos la samon ankaŭ de la patrino. Se la patrino heredigos al li pli malhelajn harojn, brunajn aŭ nigrajn, la nepo havos sur la

kapo tiujn malhelajn harojn, sed lia infano povas ricevi la flavajn. Simple dirite, ekzistas diferenco inter hereditaj genoj (genotipo de estulo) kaj ekstera aspekto (fenotipo de estulo), ĉar nur la pli fortaj (dominantaj) kvalitoj aperas ekstere.

En la malnova aŭgustena monaĥejo en Brno, kie Mendel laboris, troviĝas nun muzeo Mendelianum, en kiu oni pietate konservas lian laborejon kaj ĝardenon kaj prezentas bone aranĝitan ekspozicion pri genotiko. En majo ĉijare oni malkovris eĉ la fundamentojn de la vitrodomo (forcejo) de Mendel, en kiu li faris parton de siaj eksperimentoj. En la muzeo okazas ankaŭ sciencaj seminarioj.

- mm -

LACERTO - ANKORAŬ UNU FUŜKOMUNIKADO EN ESPERANTUJO

En la artikolo "Kiel esperantistoj komunikas" (Starto, 6/1991, pĝ.17) estas listigitaj slangaj vortoj rilatantaj al esperantistoj, kiuj komunikas mal-esperante, t.e. krokodilas, aligatoras kaj kajmanas, uzante etnolingvojn en esperantistaj medioj. Male gavialo agas malsame, parolante Esperante en ne-esperantistaj medioj. Mi deziras prezenti tie ĉi ankoraŭ unu reptilion, la lacerton, kiu estas parenca al la gaviala, ĉar ankaŭ lia agado estas analizebla kiel patologia manifestiĝo de lingvouzo. Tiuj ĉi skvamuloj montras sin en situacioj karakterizitaj per emocia ekscitiĝo, psika streso, fizika kaj mensa laceco kaj ekstrema kolero.

La esperantistoj - lacertoj ja kapablas esprimi sin bone en Esperanto sed, kiam trafas ilin unu el la ĉi-supre menciitaj

statoj, okazas krak' en la kap', kaj ili ne plu kapablas formuli siajn pensojn en kohera, senĉava Esperanto. Oni povas observi tiun fenomenon ne nur en la parolata lingvo, sed ankaŭ en skribaj tekstoj kiel leteroj. Jen du ekzempleroj, unu orelfrapa, la alia okulfrapa.

Mi observis belan ekzempleron de lacerto okaze de la Universala Kongreso en Helsinko en 1969. Mi staris en viclinio de memserva restoracio kaj aŭdis, kiel ulo komencis disputi kun la kasistino pro iu miskompreno. Ĉar la virino, kiu ne estis esperantisto, ne komprenis, kion la viro diris al ŝi, li pli laŭte kaj pli kolere elbuŝiĝis siajn plendojn en la zamenhofa lingvo, sed tute vane. Finfine li ĉesis uzi la Internacian Lingvon kaj daŭrigis la kriaĉadon en la itala lingvo, malgraŭ tio, ke en la lokalo estis pluraj enlandaj samideanoj, kiuj estus povintaj helpi lin per interpretado. Estas evidente, ke lia ekscitiĝo tute obstrukcis lian kapablon paroli en Esperanto kaj ankaŭ lian povon agi racie. Li, do, lacertis.

Mi trovis la duan lacerton en Budapeŝto, Hungario. Li estis sinjoro, kiu senbaze super-taksis sian lingvoscion. Li komencis korespondi kun mi pri lingvaj demandoj, sed ĉar lia uzo de Esperanto ne tute akordis kun akceptitaj internaciaj normoj, mi atentigis lin pri kelkaj gramatikaj eraroj, hungarismoj kaj ankaŭ stilaj misaĵoj en liaj leteroj. Nu, tiu ulo, kiu verkis, tradukis kaj eĉ volis polemiki en Esperanto, perdis la eblon vortigi siajn pensojn en tiu lingvo, ĉu pro honto pri jam faritaj eraroj, ĉu pro timo fari novajn erarojn. Sub la efiko de intensa

agitiĝo, li resendis mian leteron, kiun li makulis per skribaĉitaj komentoj en sia gepatra lingvo, kiu estas fremda al mi. Tiel finiĝis nia interkomunikado, ĉar unu el la korespondantoj lacertis.

Povas esti, ke preskaŭ ĉiu esperantisto estas potenciala lacerto kaj en streĉa situacio montros siajn reptiliajn trajtojn. Iu, kiu batas sian fingron per martelo dum najlado, plej verŝajne eligos la plej orelagacajn sakraĵojn kaj blasfemojn ne en Esperanto, sed pretervole en sia gepatra lingvo. La doloro, same kiel la kolero, serĉas la plej facilan vojon por aŭdigi sin.

Antaŭ kelkaj jaroj mi ricevis leteron en la hungara lingvo de bone konata instruisto de Esperanto en la Universitato de Budapeŝto. Plurfoje mi kritikis la subnorman lingvouzon de kelkaj el liaj studentoj, do mi konjektis, ke li ne skribis al mi en Esperanto, por ke mi ne povu trovi erarojn en lia letero.

Ne nur honto pri fuŝa lingvouzo estas la kaŭzo skribi etnolingve. Kelkfoje mi ricevis de korespondantoj, kiuj skribis anglalingve, la pretekston, ke ili estas tro lacaj surpaperigi siajn pensojn en Esperanto.

Ĉu estas iu maniero forigi lacertojn el la Esperanta lingvokomunumo? Mi opinias, ke ne, ĉar ili estas tre rezistemaj bestoj, kiuj daŭre aperas kaj reaperas. Oni devas toleri ilin same kiel eternajn komencantojn.

Julio 1992

Bernard Golden, Damjanich u. 1/C. I.8., H-8200 VESZPRÉM, Hungario

KORESPONDI DEZIRAS:

El Rusujo:

* Vladimircova Irena (14-jara), Str. Mira 13-130, 626440 Niĵnevartovsk - 23 * Ljohanova Mari-na (14-jara), Str. Mira 23-151, 626440 Niĵnevartovsk - 23 * Ozjuba Irena (14-jara), Str. Severnaja 28-124, 626440 Niĵnevartovsk - 23 * Nurejeva Gulja (15-jara), Str. Ĵukova 3-20, 626440 Niĵnevartovsk *

El Ukrainio:

* Vera Volkova, ul. Vasilevskogo 49, kv.51, 333047 Simferopol, Krim.; 30-jara instruistino interesiĝas pri lingvoj, litetaruro, arto kaj historio, ŝi kolektas bildokartojn pri arto *

El Hungario:

* Bacher György, Raktár u. 21.10.29, H-1035 Budapest III; li volas korespondi pri ĉiuj temoj *

El Usono:

* Peter Brown, 1621 Storrs rd., Storrs, Connecticut 06268; 34-jara profesoro de hispana lingvo volas korespondi pri ĉiuj temoj, kolektas bildokartojn, monerojn kaj librojn en Esperanto *

Rada ĈES oznamuje, že se ve dnech 24.- 26.10.1992 uskuteční v Pardubicích konference ČES o aktuálních otázkách esperantského hnutí a o činnosti ČES. Konference se zúčastní zástupci všech EK a všech složek ČES. Jako hosté se mohou zúčastnit i ostatní zájemci. Další informace získáte u vedoucích EK, sekcí, nebo přímo u členky rady ČES, Věry Podhradské, Poříčí 1, 603 00 Brno.

Ĉeský esperantský svaz
110 01 Praha 1, Jilská 10
***** STARTO *****

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.
Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro:
Miroslav Malovec, Bosonožská 7,
625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.
Administratoro: Karel Daněk, p.k. 425,
660 25 BRNO 2, Ĉeĥoslovakio.
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte
ĉe nia asocio.

Nepravideľný vĕstník Ĉeského esperantského
svazu. Vychází 6x roĉně. Obdrží členové
svazu. Odpovědný redaktor - Miroslav
Malovec, Bosonožská 7, 625 00 Brno.
Administrátor: Karel Daněk, pošt. přihr.
425, 660 25 Brno 2.

NOVINOVÉ DOPLATNÉ

Dohlédací pošta
664 03 Podolí u Brna
Povoleno JmŘS Brno
č. j. P/3-8847/91
ze dne 28.8.1991